



PROGRAMO

Esperanto-semajno en Leeuwarden de la 26a de aŭgusto ĝis inkl. la 2a de septembro

dimanĉon, la 26an de aŭgusto 2018

Komenco de la Esperanto-semajno kaj la fino de la Antila semajno.

14.30 - 15.00 h Kantante Kajto (Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma) komencos la Esperanto-semajnon. Dancante ni partoprenos la finon de la Antila semajno.

lundon, la 27an de aŭgusto kaj mardon kaj la 28an de aŭgusto 2018

12.00 - 18.00 h Informbudo

16.00 - 17.00 h *Tio kion vi delonge volis demandi pri Esperanto*

merkredon, la 29an de aŭgusto 2018

ekde 14.00 h Bert de Wit (Nederlando) kaj Yves Nevelsteen (Flandrio) donos kelkajn provlecionojn, dum tiu ĉi posttagmezo kaj rakontos kiel oni povas uzi Esperanton.

ĵaŭdon, la 30an de aŭgusto 2018

ekde 12.00 h Bert de Wit kaj Yves Nevelsteen prizorgos tiun ĉi lernotagon. Filmetojn, provlecionojn, muzikon, ludojn. Tiel facila estas Esperanto!

20.00 h - Koncerto de la Frisa/Esperanto-muzikgrupo Kajto - Kvarope (Nanne Kalma, Ankie van der Meer, Marian Nesse kaj Marita Kruijswijk) kun la membroj de la Fest-Folkbando 'Plunder', kiel specialaj gastoj. En 1987 la grupo Kajto komenciĝis kanti kanzonojn bazitajn sur originalaj Esperanto-taktoj. En 1988 ili eldonis sian unuan KD-n. Ili prizorgas prezentadojn en ĉiuj partoj de la mondo. Ili akompanas sian kantadon per diversaj instrumentoj. Dum la koncerto ili anoncos kaj enkondukos ĉiun kanton - ofte kun multe da humuro.

vendredon, la 31an de aŭgusto 2018

12.00 - 18.00 h - Informbudo

16.00 - 17.00 h - *Tio kion vi delonge volis demandi pri Esperanto...*

19.00 - 21.00 h Koncerto de Radio Esperanto, muzikgrupo el Groningen kun muziko el la Balkanlandoj, Grekio kaj Mezoriento. La nomo de la grupo estas konscie elektita: *Ni ĉiuj povas revii pri la fratiĝo de fremduloj ne pensante pri nacieco, kulturo aŭ politika prefero. Muziko estas la gluo inter la diferencoj, kiuj disigas nin, ĉar muziko estas en ĉiuj tagaj aferoj. Muziko kaj Esperanto ambaŭ estas universalaj lingvoj.* Ĉi-vespere ili aŭskultigas la kanton 'Mi memoras' en Esperanto de la rusa Esperantisto Nikolao Hohlov.

Katalin Kováts (Esperanto-instruistino el Hungario, de Edukado.net) intertempe prezentos Esperanton. Mallonge sed energie.

sabaton, la 1an de septembro 2018

9.00 - 12.00 h Radio kaj televidelsendo de Omrop Fryslân.

Dum tiu ĉi sabato speciala programo estos prezentata de tri diversaj Esperanto-grupoj en Nederlando. Esperanto Nederland, Internacia Esperanto-instituto kaj la Nederlanda Esperanto-Junularo. Ĉiuj estos bonvenaj.

sabaton, la 1an de septembro 2018

Ekde la 10.00 h.: Akcepto en MeM (Prinsentuin, Leeuwarden).

Tresoar, (zaal A), Boterhoek 1, 8911 DH Leeuwarden

11.00 - 12.30 h. - Nederlandlingva programo kun diversaj mallongaj programeroj. Enkonduko pri laorigino de Esperanto. Esperanto kaj Interreto de Yves Nevelsteen. Provleciono de Katalin Kováts.

Koncize: **Tio kion vi delonge volis demandi pri Esperanto.....**

14.00 - 14.45 h. - Marc Konijnenberg rakontas pri siaj spertoj kiel volontulo en la urbo *Białystok*, la naskiĝurbo de L.Zamenhof (nederlandlingve).

14.45 - 15.15 h. - Yves Nevelsteen - Marknomoj en Esperanto (nederlandlingve)

Tresoar (zaal B), Boterhoek 1, 8911 DH Leeuwarden

11.00 - 11.45 h. - Saïd Baluĉi - Kial Esperanto aparte gravas por aziaj intelektuloj (en Esperanto)

11.45 - 12.30 h. Ward de Kock - prelego pri la Frisa Esperantisto Wijtze Nutters (1872-1926) socialdemokrata kaj komunisto en la laborista Esperanto-movado (nederlandlingve)

14.00 - 14.45 h. Nederlanda Esperanto-Junularo prizorgos la programon. (dulingve: *esperanto kaj nederlanda*)

15.15 - 16.45 h - foriro de MeM - promenado tra Lân fan Taal (Lando de Lingvo) (en Esperanto).

16.00 - 18.00 en MeM - koncerto de Jonny M (Germanio)

Jonny M aktivas kiel rege-kantisto en Esperanto. En 2013 aperis lia unua Esperanto-KD 'Regestile'. Li jam koncertis en Eŭropo, Japanio kaj Brazilo.

dimanĉon, la 2an de septembro 2018,

11.00 h - promenado tra Leeuwarden, kun klarigo en Esperanto. Ĝi ekos ĉe la MeM-ejo.

12.30 - 13.30 h. MeM - Tra la mondo per Esperanto!

Informiĝu babilante kaj faru viajn demandojn. Kiamaniere vojaĝi per Esperanto; kiel Esperanto povas helpi vin trovi kontaktojn kaj dormlokojn en preskaŭ ĉiuj landoj en la mondo. Aŭskultu la rakontojn de Esperantistoj.

14.00 - 15.15 h 'canon, kanon, kanono'..... Kun-Kant-Kanonado kun Kajto.

Ĉiuj, kiuj emas kanti, povos kunkanti. Kantante ni transdonos la bastoneton al la Rusoj.

15.15 h fino de la Semajno de Esperanto, la rusa semajno komenciĝos.